Se oni ekzemple sukcesus stimi $\Delta Re = \frac{D\varepsilon_2}{DX}$, oni ricevus informon pri tio, kiel malgrandiĝas la fidendeco de la respondilo sub influo de la eraro en skorado.

Oni supozu, ke estas uzata skorado de la tipo 0 – 1 (t. e. ekzemple por ĝuste respondita testero estas atribuata skoro 1, por malĝuste respondita testero ricevatas skoro 0). Por montri ekzemplon oni distingu nur du eblajn specojn de la necerteco de skorado, kiuj estas priskibataj pere de du specoj de kontinuaj hazardaj grandoj e_1 , e_2 kun densecoj de probablo, kis grafikaĵoj montriĝas en la bildoj 1 kaj 2. En la unua kazo (vidu la bildon 1, kie oni elektas ε_2^1 kun supra indekso [1]) temas pri du variantaj densecoj (unu por la kazo, ke oni elektas la skoron 1, la dua por la elekto de la skoro 0), difinitaj per jenaj rilatoj:

a) elekto de la skoro 1: $f_1(x) = 2x;\ 0 \leq x \leq 1$
$= 0$ alie;

b) elekto de la skoro 0: $f_2(x) = 2 - 2x;\ 0 \leq x \leq 1$
$= 0$ alie.

Ambaŭ hazardaj grandoj el a) kaj b) havas la samajn variancojn. La komuna varianco estas egala al $\frac{1}{18} \sim 0,0556$. En la demandilo kun nombro n de eroj estas la varianco $D\,\varepsilon_2^1$ poste egala al

$$D\,\varepsilon_2^1 = \frac{n}{18} \sim 0,0556\,.\,n. \qquad (7)$$

Simile ankaŭ en la dua kazo estas du densecoj de hazardaj grandoj en la formo

a) por elekto de la skoro 1: $f_1(x) = 8x - 4;\ 0{,}5 \leq x \leq 1$
$= 0$ alie;


b) pro elekto de la skoro 0: $f_2(x) = 4 - 8x;\ 0 \leq x \leq 0{,}5$
$= 0$ alie.

Varianco estas en la kazoj a) kaj b) la sama kaj egala al $\frac{1}{72} \sim 0,0139$. Tial dum indikitaj kondiĉoj de decidado (oni elektas en tiu ĉi kazo priskribon ε_2^2 kun supra indekso [2]) estas

$$D^{\varepsilon_2^2} = n\,.\,\frac{1}{72} \sim 0,0139\,n. \qquad (8)$$

Surbaze de la esprimoj (7) kaj (8) eblas prijuĝi la grandecon de la ŝanĝo de fidindeco de la demandilo sekve de la ŝanĝo de necerteco de stimo de la demandila skoro pere de kvociento, kiu ne plu dependas de DX kaj n :

$$\frac{\Delta Re_1}{\Delta Re_2} = \frac{D\varepsilon_2^1}{D\varepsilon_2^2} = \frac{\frac{n}{18}}{\frac{n}{72}} = 4\ . \qquad (9)$$



Grafikaĵoj de densecoj de dispartigo (1) *kaj* (2).

Elekto de la skorada procezo estas ankaŭ elekto de la necerteco de skorado rilate al la demandilaj eroj. Se la decidado estas pli komplika (vidu la bildon 1), ĝi enhavas pli grandan necertecon de la elekto de skoro. Tiu fakto estas ĉi tie esprimata per kvaroble pli granda valoro de ΔRe_1 rilate al ΔRe_2.

Nun oni konsideru pli malkomplikan situacion, kiam oni aplikas la demandilon al aro da respondantoj kun proksimume la sama nivelo. Dum tio oni krome konsideru, ke la demandilo konsistas el eroj samgrade malfacilaj. Poste oni povas noti

$$X = \sum_{i=1}^{n} X_i \,; \quad EX_i = p\,; \quad DX_i = p\,(1-p); \quad 0 \le p \le 1$$

$$DX = \sum_{i=1}^{n} D\,X_i + 2 \sum_{i<j} \varrho_{ij} \sqrt{DX_i}\,\sqrt{DX_j} = n\,p\,(1-p)\,[\,1 + (n-1).\,\bar{\varrho}\,],$$

$$\bar{\varrho} = \frac{2}{n(n-1)} \sum_{i<j} \varrho_{ij}\,,$$

kie X_i indikas skoron de la i-a ero ($X_i \in \{0,1\}$), EX_i, resp. DX_i mezan valoron, resp. variancon de skoro de la i-a ero, kaj ϱ_{ij} korelacion inter la skoroj de la i-a kaj j-a eroj.

El la rilato (2) por la indikilo de fidindeco de la dermandilo poste per substituo al DX estas atingata rilato por *Re* en la formo

$$Re = 1 - \frac{D\varepsilon}{np(1-p)[\,1+(n-1)\bar{\varrho}\,]} \tag{10}$$

Surbaze de la antaŭa rilato oni konstatas, ke la fidindeco de demandilo [stimata pere de la indikilo (2)] pligrandiĝas kune kun altigo de la nombro de demandilaj eroj *n*. Aliflanke, la fidindeco estas ankaŭ dependa de la nivelo de la populacio (stimata pere de *p*) de respondantoj, en kiu estas la demandilo aplikata.

Oni do ne povas kompreni la indikilon *Re* kaj ĉiujn kromajn indikilojn de la fidindeco, elirantajn de la rilato (2), ekzemple la formulon se Spearman – Brown aŭ la alfon de Cronbach, kiel ekskluzive demandilan karakterizaĵojn.

Konkludo

Fidindeco de la demandilo, stimata pere de la esprimo (2), dependas interalie de la populacio de respondantoj, por kiu la demandilo estas destinita, kaj krome de la necertecoj de la skorada procezo (priskribata bone aŭ malbone en la aplikinstrukcio de la konsiderata demandilo). La plej grandan fidindecon havas la demandilo aplikata al la populacio, kies nivelo rilate al al demandilo ne estas tro malalta aŭ ankaŭ ne tro alta: el la rilato (10) ja krome evidentiĝas, ke *Re* atingas pli altan valoron, se $p \sim 0{,}5$).

Literaturo

Cronbach, L.J.: Coefficient alpha and the internal structure, *Psychometrika* 16, 1951, 297 – 334
Lienert, G.A.: *Testaufbau und Testanalyse*, Weinheim, 1967
Lord, F. M.: *Applications of Item Response Theory to Practical Testing Problems*, Hillsdale, NJ, Erlbaum 1980
Půlpán, Z.: *K problematice zpracování empirických šetření v humanitních vědách*, Academia, Praha 2004
Richardson, M. W.: Notes on the rational of item analysis, *Psychometrika* 1, 1936, 69 – 76
Richardson, M. W., Kuder, G. F.: The calculation of test reliability coefficients based upon the method of rational equivalence, *J. Educ. Psychol*. 30, 1939, 681 - 687
Zvára, K.: Měření reliability aneb bacha na Crombacha, *Informační Bulletin ČStS,* č. 2, roč. 13, 2002, 13- 20

Ricevita 2013 – 07 – 29

Adreso de la aŭtoro: Prof. RNDr. PhDr. Zdeněk Půlpán,CSc., Na Brně 1952/39, CZ- 500 09, Hradec Králové 9, Zdenek.Pulpan@klikni.cz

What determines the reliability of the questionnaire? (Summary)

The reliability of the questionnaire, estimated by the expression $Re = 1 - \frac{D\varepsilon}{DX}$, depends also on the population, for which the questionnaire was addressed, and on the uncertainties of scoring procedures (described well or poorly in the manual of the questionnaire under consideration). The highest reliability is then the one of the questionnaire applied in the population, whose level due to the questionnaire is not too low, or too high (it is evident that larger value *Re* is achieved, if p ~ 0.5, in the equation $Re = 1 - \frac{D\varepsilon}{np(1-p)[\,1+(n-1)\bar{\varrho}\,]}$).

grkg / Humankybernetik
Band 55 · Heft 1 (2014)
Akademia Libroservo / IfK

Ontische Existenz und semiotische Evidenz

von Alfred TOTH, Tucson (USA)

1.
Das Objekt ist selbstevident. Ein natürliches Zeichen ist, insofern es "bezugnehmend auf einen Teil seiner selbst" ist (Bense 1975, S. 39), ebenfalls wenigstens hinsichtlich dieses Teils seiner selbst, ontisch selbstevident. Hingegen ist ein Ostensivum, d.h. ein als Zeichen gebrauchtes Objekt, nur bei geeigneter ontischer Situation selbstevident (vgl. Toth 2011). Das Zeichen hingegen ist nur qua seiner Realitätsthematik ontisch evident, im Falle der mit ihrer Zeichenthematik dual identischen Eigenrealitätsklasse (vgl. Bense 1992) allerdings semiotisch selbstevident. Diese semiotische Evidenz ist ferner, wie Walther (1982) bewiesen hatte, eine Invariante des algebraischen Verbandes der zehn semiotischen Dualsysteme, d.h. sie inhäriert jeder möglichen Zeichen- und Realitäthematik, sofern die trichotomische Wohlordnung der semiotischen Subrelationen gewahrt ist.

2.
In Toth (2013) wurden vier kombinatorische Typen präsenter und existenter Objekte anhand der folgenden Matrix vorgeschlagen.

	+EX	–EX
+PRÄS	+PRÄS, +EX	+PRÄS, –EX
–PRÄS	–PRÄS, +EX	–PRÄS, –EX


Nicht-trivial sind hier die beiden Kombinationen mit ungleichen Vorzeichen. Präsente, aber nicht-existente Objekte sind ontische Konstrukte aus epistemischen Zeichen, d.h. solchen, deren Metaobjektivationen keine ontisch selbständigen Objekte als Domänenelemente haben, wie z.B. das Sandmännchen. Die Gegenstücke sind existente, aber nicht-präsente Objekte, deren Metaobjektivationen keine Zeichen als Codomänenelemente haben, d.h. nicht zu Zeichen erklärte Objekte. Es gibt somit ontisch selbständige und ontisch nichtselbständige Objekte und damit selbständige und unselbständige Existenz. Die letztere ist natürlich subjektsymbiotisch. Diesen beiden Formen von Existenz steht damit ferner selbständige und nicht-selbständige semiotische Evidenz bzw. eigenreale und fremdreale Repräsentation gegenüber.

Ähnlich wie jedes selbständige Objekt gleichzeitig Bewußtseinsobjekt ist, ist jedes fremdreale Zeichen vermöge des Waltherschen Satzes der eigenrealen Determinanz (Walther 1982) gleichzeitig eigenreal.

3.
Wenn wir unsere bisherigen Ergebnisse zusammenfassen, haben wir also

	selbständig	unselbständig
Objekt	ontisch	epistemisch
Zeichen	eigenreal	fremdreal.

Da man auch präsente, aber nicht-existente Objekte als ontische Konstruktionen darstellen kann (z.B. ein Text, eine Zeichnung, eine Puppe oder ein Schauspieler als Räuber Hotzenplotz), ergibt sich nun aber eine interessante Asymmetrie zwischen Präsentation und Existenz einerseits und Repräsentation und Evidenz andererseits:



Da also präsente Objekte, egal, ob sie existent oder nicht-existent sind, evident repräsentiert werden können, ergibt sich eine völlig neue Begründung für die Nicht-Konvertibilität der Metaobjektivation: Nur dann, wenn lediglich existente Objekte zu Zeichen erklärt würden, wäre die Abbildung von Objekten auf Zeichen umkehrbar. Umgekehrt ausgedrückt, würde die Forderung der Konversion der Metaobjektivation die Existenz von Bewußtseinsobjekten implizieren, d.h. wenn (und weil) ich z.B. einen Drachen zeichnen könnte, würde dessen selbständige ontische Existenz zwingend aus seiner semiotischen Evidenz folgen. Diese Umkehrabbildung würde also genau dem alttestamentlichen Schöpfungsakt korrespondieren, in dem ja Gott die Objekte erzeugt, indem er ihre Namen ausspricht, d.h. Evidenz erzeugt Existenz. Damit wäre jedoch der logische Identitätssatz suspendiert, und bei Bestehen der klassischen aristotelischen Logik folgt somit die Falschheit der Annahme der metaobjektischen Umkehrfunktion e negativo.

Schrifttum:
Bense, Max: Semiotische Prozesse und Systeme. Baden-Baden 1975
Bense, Max: Die Eigenrealität der Zeichen. Baden-Baden 1992
Toth, Alfred: Semiotische Objekte und Ostensiva. In: Electronic Journal for Mathematical Semiotics, 2011
Toth, Alfred: Existenz und Präsenz. In: Electronic Journal for Mathematical Semiotics, 2013
Walther, Elisabeth: Nachtrag zu Trichotomischen Triaden. In: Semiosis 27, 1982, S. 15-20

Eingegangen 2014 – 01– 02

Anschrift des Verfassers: Prof. Dr. Alfred Toth, 8225 East Speedway, Apt. 1013, Tucson, AZ 85710, USA

Objectal Existence and Semiotic Evidence (Summary)

The dichotomy of objectal existence and semiotic evidence is replaced by a 2x2 matrix based on the two linearily independent features of Presence and Existence whose 4 combinations are intended to serve as an intermediary system between the system of the designed objects and the system of its designing signs.

grkg / Humankybernetik
Band 55 · Heft 1 (2014)
Akademia Libroservo / IfK

Skizo pri la uzo de planlingvoj en aŭtomata tradukado

de Luís Guilherme SOUTO JARDIM, Charqueada (BR)

Eseo el la Postdiplomaj studoj de interlingvistiko, Universitato Adam Mickiewicz, Poznań (PL)

1. Enkonduko

En ĉi tiu artikolo ni pritraktos la maŝintradukadon (MT), branĉon de aŭtomata tradukado, kiu estas procezo tradukanta tekston aŭ parolon de unu natura lingvo al alia pere de komputilo. Ni tuŝos la historion de maŝintradukado kaj ties diversajn tipojn, laŭ la metodo de traduko aŭ laŭ la traduka vojo. Ni montros, kiel kaj kial maŝintradukado profitas de planlingvoj por faciligi la procezon, kaj kia estas la rolo de Esperanto meze de tiu scenejo.

2. Difino

La esprimo "traduki" en vasta senco signifas "*transigi en alian lingvon*" kaj ampleksas du sub-signifojn:

• transigi skriban tekston el unu lingvo en alian = traduki en strikta senco.
• transigi paroladon aŭ konversacion el unu lingvo en alian = interpreti[1].

Maŝina tradukado aŭ perkomputila tradukado (MT) estas la apliko de komputiloj al la tasko traduki tekstojn, parolojn aŭ eĉ mesaĝojn de unu natura lingvo al alia. Ĝi estas unu el la tre fruaj okupoj en komputiko. MT pruviĝis esti iom iluzia celo, sed hodiaŭ estas disponebla racia nombro da sistemoj produktantaj eligojn, kiuj, se ne perfektaj, estas sufiĉe bonkvalitaj por esti utilaj en kelkaj specifaj terenoj[2]. Maŝintradukado nuntempe ampleksas komputikan lingvistikon kaj lingvan inĝenierikon, kiuj entenas multlingvajn aspektojn.

Perkomputila tradukado (MT) estas la plej frua apliko de komputilo en lingva tereno. Fakte, la esploro pri la tereno preskaŭ inkludas ĉiujn subterenojn de lingva komputiko, se ni kunkonsideras parolan tradukadon per internacia telefona reto.

---

1. Einführung in die maschinelle Übersetzung (Enkonduko al maŝina tradukado) - http://www.aissanmarino.org/kursoj/s1/mt/lec01.html
2. En la lasta retejo de la Google Factory Tour, esploristo Franz Och prezentis la aktualan staton de la Google Machine Translation Systems. Li komparis tradukojn de la nuna Google-tradukisto, kaj la status quo de la agado de Google Research Lab. La rezultoj estis tre impresaj. Al frazo en la araba, kiu estis tradukita al sensencaĵo "Alpa blanka nova ĉeesto bendo registrita por kafumi konfirmas Laden" estas nun en la Research Labs tradukata al "La Blanka Domo Konfirmas la Ekziston de nova Bin Laden-a bendo." http://blogoscoped.com/archive/2005-05-19.html#n90

Eble, en MT ankaŭ amasiĝas la plej multaj esploristoj pri lingva komputiko. Tiun fakton konfirmas la situacio, ke ni trovas la plej riĉan materialon pri MT ankaŭ en Esperanto." (Liu, 2006)[3].
Jen kelkaj el tiuj teorikampoj:

• Maŝintradukado aŭ maŝinhelpa tradukado
• Teorio de homa tradukado kaj praktiko
• Multlingva tekstoprilaboro
• Multlingva natura interfaco
• Multlingvaj sistemoj por kompreno de mesaĝoj
• Korpusbazita kaj statitika lingvo-modeligo
• Kontrastiva lingvistiko
• Mofologio, sintakso, semantiko kaj pragmatiko
• Lingva instruado kaj lernado per komputilo
• Geolokigaj softvaroj
• Parolrekonado kaj paroltradukado
• Fonetiko kaj fonologio

3. Skizo de la historio

La ideo pri maŝina tradukado povas esti spurita al la 17a jarcento. En 1629, René Descartes proponis universalan lingvon kun ekvivalentaj ideoj en malsamaj lingvoj, rilate al unu sama simbolo. La ĝisnunan historion de MT eblas dividi en *tri periodojn* por pli bone kompreni ĝian disvolviĝon.

La unua periodo, de 1954-1966, estis karakterizita per optimismo. La kampo de "maŝina tradukado" aperis en "Warren Weaver's Memorandum on Translation" (1949). La unua esploristo en tiu kampo estis Yehosha Bar-Hillel, kiu komencis siajn esplorojn ĉe MIT (1951)[4]. Oni havis tiuepoke la naivan ideon pri perfekta kaj ideala tradukado de la homa natura lingvo. Oni povas diri, ke tiam la kompreno pri la problemo de la homa lingvo estis subtaksata. MT esploroj ekaperis en Japanio kaj Rusio (1955), la unua konferenco pri MT okazis en Londono (1956). En 1962, en Usono, oni fondis la Asocion por Maŝintradukado kaj Komputika Scienco, kaj "National Academy of Sciences" kreis ALPAC-n (Automatic Language Processing Advisory Committee) en 1964.


La dua periodo komenciĝis per granda bato por MT. Ĝi estis la ALPAC-raporto de 1966. En tiu raporto, la origina ideo pri perfekta kaj ideala tradukado estis disrompita kaj seniluziigis la esploristojn. Unu el la konsekvencoj estis, ke post tiu raporto la celsistemoj eniris novan fazon pli realisman kaj pli praktikan. En 1976 ekaperis en la Eŭropa Komunumo la sistemo SYSTRAN, uzata ĝis hodiaŭ kun 36 lingvoparoj. La firmao Siemens uzis en 1980 la sistemon METAL (Machine evaluation and translation of natural language). La Tut-Amerika Organizo pri Sano ekuzis sistemon PAHO MTS por traduki inter la Angla kaj la Hispana, la plej parolataj lingvoj de la Amerikoj.

3. Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft/ Humankybernetik, 2006(3), S.124-135.
4. http://en.wikipedia.org/wiki/Machine_translation

Oni povas diri, ke la tria kaj la plej fruktodona periodo de MT daŭras de 1997 ĝis hodiaŭ. Tiam oni komencis denove ekhavi praktikajn rezultojn, uzante pli ampleksajn kaj pli modernajn komputikajn rimedojn, kiuj nun estas disponeblaj pro la disvolviĝo de la komputila hardvaro kaj softvaro. Tiu fazo komenciĝis per la programo AltaVisa Babelfish, kiu atingis 500,000 alirojn tage en 1997. Franz-Josef Och (la estonta kunordiganto de la teamo pri tradukado de Google) venkis DARPAn konkuradon pri rapideco en 2003. Al pliaj novaĵoj povas esti inkludita MOSES, libera statistika maŝintraduka sistemo (2007), la teksto/SMS traduka sistemo por porteblaj telefonoj en Japanio (2008), kaj parol-al-parola traduka sistemo por poŝtelefonoj de la Angla al la Ĉina kaj la Japana (2009). Finfine ni alvenas al la plej furora sistemo de maŝintradukado, la sistemo de Google, kiu respondecas por la popularigo de MT. Google anoncis, ke ĝia sistemo tradukis tekstojn sufiĉajn por plenigi unu milionon da libroj en nur unu tago (2012).

4. Procezoj kaj metodoj

Se oni provas kompreni la homan procezon de tradukado, oni alvenas al la simpla formulo, kiu estas: dekodigi la signifon de la fonto-teksto kaj rekodigi tiun signifon en la cellingvo. Malgraŭ ke oni povas taksi tiun procezon simpla, en ĝi kuŝas kompleksa cerba procezo. La komplekseco postulas ĝuste kompreni la kuntekston, la kulturon de ambaŭ lingvoj, kaj krome profundan konon de ambaŭ gramatikoj, semantikoj, sintaksoj k.t.p.. Por solvi tiun problemon ekzistas pluraj metodoj, sed oni povas dividi ilin *laŭ la maniero* (aŭ algoritmo), kiun la programo uzas, en *regul-bazitaj metodoj, statistikaj metodoj kaj hibridaj metodoj* kaj laŭ la vojo en *rekta, transfera kaj interlingva.* (Dorr, Hovy k. Levin, 2003)[5]




http://eo.wikipedia.org/wiki/Maŝintradukado

5. Natural Language Processing and Machine Translation Encyclopedia of Language and Linguistics, 2nd ed. (ELL2). Machine Translation: Interlingual Methods Bonnie J. Dorr, Eduard H. Hovy, Lori S. Levin: file:///Users/luisguilhermesoutojardim/Downloads/Interlingual-MT-Dorr-Hovy-Levin%20(1).pdf

Regul-bazita metodo

La regul-bazita metodo provas kompreni, kiel funkcias kaj kiel estas organizita la fonto-lingvo. Ĝi transformas la tekston en ian mezan reprezentadon. Povas okazi, ke oni uzas ian interlingvon en tiu procezo. Tiu metodo bezonas grandan komprenon de la leksiko, morfologio, sintakso kaj semantika informo, kaj krome grandan kvanton da reguloj. Oni povas diri, ke la regul-bazita metodo disbranĉigas la lingvon en pecetojn pli klarajn. Poste tiu teksto, jam dispecigita kaj transformita en ia intermeza simbolaro (interlingvo), estas denove rearanĝita kaj grupigita en la fonto-lingvo.



http://eo.wikipedia.org/wiki/Maŝintradukado

Statistika metodo

Se la maŝino estas plenigita per sufiĉa kvanto da datumoj, la programo povas traduki per komparado de unu lingvo al alia kun sufiĉe bona rezulto por eĉ denaska parolanto. La malfacilaĵo estas liveri la ĝustan kvanton de informoj necesaj, kiuj kontraŭe ne estas necesaj en la regul-bazita metodo. Krom la kvanto ankaŭ la kvalito kaj tipo de informo estas bezonataj. Tekstoj el pluraj tipoj devas esti en la korpusa datumbazo de la programo.[6]

6. Google asertis, ke promesplenaj rezultoj estis akiritaj uzante proprietan statistikan maŝinan tradukmotoron. La statistika tradukmotoro uzita dea Google por la araba-angla kaj ĉina-angla havis 0,4281 kalkulon super la IBM bleu-4 kun 0.3954 (somero 2006) en testoj efektivigitaj de la Nacia Instituto por Normoj kaj Teknologio.


Hibrida metodo

Tiu metodo kunligas la avantaĝojn de la regul-bazita metodo kaj la akuratecon de la statistika metodo. [7]

Du manieroj povas esti vidataj en tiu metodo: *Reguloj kiuj estas sekvataj de statistika procezado aŭ statistiko gvidata de reguloj.*

5. Interlingva tradukado

Kiel ni jam menciis, eblas klasifiki la metodojn ankaŭ laŭ la vojo, kiu povas esti rekta, transfera kaj interlingva. En la Rekta Metodo la vortoj estas tradukitaj rekte de unu lingvo al alia, sen la paso tra ia kroma meza reprezentado. Tiu meza reprezentado en la Transfera Metodo estas ia abstrakta, ne-lingva reprezentado kaj en la interlingva Metodo tiu reprezentado estas unu interlingvo, kiu ne dependas de la fontolingvo nek de la cellingvo.



http://en.wikipedia.org/wiki/Interlingual_machine_translation

Estas simple kalkuli la avantaĝon laŭ la kvanto da lingvoparoj. Se oni havas 4 lingvojn (a) on bezonas 12 programojm aŭ ses lingvoparojn por traduki de ĉiu fontoligvo al ĉiu cellingvo, ***N*(N-1),*** kie N estas la nombro de donitaj lingvoj. Kontraŭe se oni uzas unu interlingvon (b), estas bezonataj 8 programoj aŭ kvar lingvoparoj, ***2*N***, kiuj ĉiam inkluzivas la interlingvon. Tiu avantaĝo pligrandiĝas, kiam la nombro de lingvoj kreskas. Tamen la avantaĝoj ne estas nur en la ekonomio de paroj, sed precipe en la kvalito de la rezulto.

Ni vidu la transferan kaj interlingvan metodojn, kiuj baziĝas sur interlingvo kreita por tiu celo, preskaŭ matematika.


7. AppTek Launches Hybrid Machine Translation Software The solution provides advances in translation software via a combination of statistical and rule-based methodologies. By Adam Boretz - Posted Mar 2, 2009 http://www.speechtechmag.com/Articles/News/News-Feature/AppTek-Launches-Hybrid-Machine-Translation-Software-52871.aspx

Transfera kaj interlingva metodoj

Dorr et al. en sia artikolo[8] analizas la interlingvajn sistemojn kaj ankaŭ la interlingvojn uzataj en tiaj sistemoj. Unu ekzemplo de la transfera metodo estas projekto **Panglos** (Frederking et al., 1994) kiu komenciĝis kiel ambicia provo konstrui riĉan interlingvajn esprimojn uzante homojn por plifortigi la analizon de la sistemo. Ankaŭ la **Mikrokosmos** projekto (Mahesh kaj Nirenburg, 1995), evoluigis **OntoSem** (Nirenburg kaj Raskin, 2004), kiu havis la fokuson produkti semantike riĉan tekstosignifan prezenton (Text-Meaning Representations TMRs) de nelimigita teksto, kiu povas esti uzata en ampleksa vario de aplikoj, inter ili kiel Interlingua MT. **Kant** estas la sola interlingva MT sistemo, kiu iam fariĝis vere funkcianta en la komerca medio. La **Kant sistemo** (Nyberg kaj Mitamura, 1992) estas scio-bazita kaj estas desegnita por tradukado de teknikaj dokumentoj skribitaj en "Controlled English" al multnombraj cellingvoj. La interlingvoj kreitaj speciale por tiuj sistemoj estas vere intersaj kaj povas respondi nian postan demandon pri la utileco de Esperanto por tiu rolo.

Interlingvoj uzataj en MT (IL) aŭ komputil-interna pontolingvo

Unu el ili estas *Universal Networking Language* (UNL), kiu estas formala lingvo evoluigita por aŭtomataj projektoj pri interŝanĝo de informoj (Martins et al. 2000). Ĝi celas esti translingva semantika reprezento de frazsignifoj formitaj de ĝeneralaj konceptoj (ekzemple "kato", "sidi", "on", aŭ "mato"), konceptoj rilataj (ekz. "agento", "loko", aŭ "celo"), kaj konceptoj predikataj (ekz. "estinteco" aŭ "definitiva"). La UNL-a sintakso uzas la reprezenton de grafeo ("hypergraph"), kies nodoj reprezentas "*universalajn vortojn*" kaj kies arkoj aŭ sagoj estas la rilatoj aŭ "*rilataj terminoj*".



The Universal Networking Language[9] , Uchida k Zhu

8. Natural Language Processing and Machine Translation Encyclopedia of Language and Linguistics, 2nd ed. (ELL2). Machine Translation: Interlingual Methods Bonnie J. Dorr, Eduard H. Hovy, Lori S. Levin: file:///Users/luisguilhermesoutojardim/Downloads/Interlingual-MT-Dorr-Hovy-Levin%20(1).pdf

9 The Universal Networking Language beyond Machine Translation[1] , Hiroshi Uchida, Meiying Zhu, UNDL Foundation September 26, 2001: http://www.undl.org/publications/UNLbeyond% 20MT.html

Estas klare, ke UNL estas ia planlingvo kreita por unu specifa celo, nome esti uzata en maŝintradukado. La sekva kaj logika paŝo estas imagi, ĉu la jam ekzistantaj planligvoj, en nia kazo Esperanto, taŭgas por tiu rolo.

6. DLT

Kiel dirite, la ideala interlingvo devus esti klara kaj samtempe sendependa de la fontolingvoj aŭ de la cellingvoj. Tiu ideala lingvo devas ankaŭ esti klara, simpla kaj kun forto specife en la morfologio kaj vortfarado. En 1981 ĝis 1990 la nederlanda firmao BSO kunordigis la projekton DLT, kiŭ celis fariĝi duonaŭtomata maŝina traduksistemo, kiu devus funkcii en komputila reto. Dum 50 jaroj da laboro DLT uzis ĝuste Esperanton (aŭ iom modifitan Esperanton) kiel interlingvon.[10]

La avantaĝoj de Esperanto kiel interlingvo (IL) estas:

- Ĝi estas duon-natura lingvo, ĝiaj riĉeco, flekseblеco kaj logikeco estas eĉ pli grandaj ol la kreitaj artefaritaj IL.
- Ĝia leksiko baziĝas sur hindo-eŭropa leksiko kaj estas facile legebla de homa okulo, kiam oni devas inspekti la mezan tekston produktitan kaj kontroli ĝian akuratecon.
- Ĝi estas regula kaj nedependa de aliaj lingvoj.
- Ĝi povas esti lernata kiel iu ajn alia homa lingvo.

La malavantaĝo de Esperanto kontraŭe estas ĝuste unu el ĝiaj avantaĝoj, ĝia natura karaktero, rezultita de jaroj da uzo en la komunumo. Homografoj, leksikaj ambiguecoj kaj strukturaj malprecizecoj estas kelkaj el la problemoj de ĝia uzo. Pro tio DLT enkondukis kelkajn modifojn por pligrandigi la leksikan bazon.[11]

7. Konkludo

Ni akompanis la historion de maŝintradukado ekde de la 1954-aj naivaj jaroj, pasante tra la pesimismaj epokoj de ALPAC, ĝis la modernaj statistikaj programoj, kiel tiuj uzataj de Google. Ni vidis, ke rekta tradukado aldonas grandan malfacilaĵon kaj postulas pli grandan kvanton da program-paroj. La uzado de artefaritaj kaj planitaj interlingvoj estis natura paŝo en tiu procezo, kaj la sekva logika paŝo estas kontroli, ĉu Esperanto ankaŭ taŭgas por tiu rolo. La DLT projekto estas speciala marko en la historio de MT, Esperanto uzita kiel interlingvo pruvis sian taŭgecon.

Prijuĝante la utilecon de planlingvo en tiu specifa rolo oni povas rimarki, ke kroma rezulto estis eltirita de tiu uzado: la pruvo, ke Esperanto estas pli logika kaj regula ol naturaj lingvoj. Esperanto montriĝis malpli ambigua ol la specifkonstruitaj artefaritaj interlingvoj (IL) de MT, kaj se ni komparas ĝin al naturaj lingvoj en tiu tereno, ĝia supereco estas eĉ pli granda. Krom tio pruviĝis ĝia pozitiva proksimeco al la naturaj

10.LIU Haitao: Informadika Aspekto de Interlingvistiko. Zusammenfassung: Interlinguistik aus der Perspektive der Informationswissenschaft.file://localhost/Users/luisguilhermesoutojardim/Downloads/Informadika%20Aspekto%20de%20Interlingvistiko.html

11. http://www.hutchinsweb.me.uk/IntroMT-17.pdf

lingvoj (neplanitaj), do Esperanto eliris el tiu scenejo pli forta ol kiam ĝi eniris, kaj ĉiuj studentoj de MT pli-malpli frue devos tuŝi la spurojn lasitajn de Esperanto en tiu tereno.

Literaturo

An Investigation Into the Use of Esperanto as an Intermediate Language in a Machine Translation Project. S. Ben-Avi University of Manchester Institute of Science and Technology. Department of Computation , UMIST, 1977

AppTek Launches Hybrid Machine Translation Software. The solution provides advances in translation software via a combination of statistical and rule-based methodologies. By Adam Boretz - Posted Mar 2, 2009

DLT http://www.hutchinsweb.me.uk/IntroMT-17.pdf

Einführung in die maschinelle Übersetzung (Enkonduko al maŝina tradukado) - http://www.ais-sanmarino.org/kursoj/s1/mt/lec01.html

Frederking, R., S. Nirenburg, D. Farwell, S. Helmreich, E.H. Hovy, K. Knight, S. Beale, C. Domashnev, D. Attardo, D. Grannes, and R. Brown. (1994): *The Pangloss Mark III Machine Translation System.* Proceedings of the 1st AMTA Conference. Columbia, MD

Gledhill, Christopher (1999): *'owards a phraseology of English and French*. In: C. Beedham (ed.) Language and Parole in Synchronic and Diachronic Perspective. Societas Linguistica Europaea. Oxford: Pergamon: 221-37

Hutchins, W. John / Harold L. Somers (1992): *An Introduction to Machine Translation.* London: Academic Press

LIU Haitao: *Informadika Aspekto de Interlingvistiko*. Zusammenfassung: Interlinguistik aus der Perspektive der Informationswissenschaft: file://localhost/Users/luisguilhermesoutojardim /Downloads/Informadika%20Aspekto%20de%20Interlingvistiko.html

LIU Haitao (2006): *Syntactic Parsing Based on Dependency Relations*. In: Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft/ Humankybernetik, 2006(3), S.124-135

Natural Language Processing and Machine Translation. Encyclopedia of Language and Linguistics, 2nd ed. (ELL2). Machine Translation: Interlingual Methods. Bonnie J. Dorr, Eduard H. Hovy, Lori S. Levin: file:///Users/luisguilhermesoutojardim/Downloads/Interlingual-MT-Dorr-Hovy-Levin %20(1).pdf

Mahesh, K. and S. Nirenburg (1995): *A Situated Ontology for Practical NLP.* Proceedings of the Workshop on Basic Ontological Issues in Knowledge Sharing at IJCAI-95. Montreal, Canada

Martins, T., L.H. Machado Rino, M.G. Volpe Nunes, G. Montilha, and O. Osvaldo Novais (2000): An interlingua aiming at communication on the Web: How languageindependent can it be? Proceedings of Workshop on Applied Interlinguas: Practical Applications of Interlingual Approaches to NLP. Workshop at ANLPNAACL. Seattle, WA

Maxwell, Dan (1992): *Multilingual Machine Translation.* Esperantic Studies, Number 3 Summer 1992 URL: <http://esperantic.org/esf/es3.htm

Natural Languages Translation Using an Intermediate Language. IAENG International Journal of Computer Science, 33:1, IJCS_33_1_20 Keerthi Kamal Adusumilli, Member, IAENG Advance online publication: 13 February 2007

Neijt, A. (1986): *Esperanto as the focal point of machine translation*. In: Multilingua, 5-1 (1986), pp. 9-13

Neijt, A. (1992): *Esperanto as an intermediate language in machine translation.* In Computers in Translation, John Newton (ed.), 78-95. London: Routledge

New directions in machine translation. Conference proceedings, Budapest, 18-19 August, 1988 Dan MAxwell; Klaus Schubert; APM Witkam; Buro voor Systeemontwikkeling; Neumann Janos Szamitogeptudomany Tarsasag. http://www.worldcat.org/title/new-directions-in-machine-translation-conferenceproceedings-budapest-18-19-august-1988/oclc/20309150Distributed languagetranslation

Nirenburg, S., V. Raskin and B. Onyshkevych (1995): *Apologiae Ontologia.* Proceedings of the International Conference on Theoretical and Methodological Issues (TMI). Leuven, Belgium.

Nyberg, E. and T. Mitamura (1992): The KANT *System: Fast, Accurate, High-Quality Translation in Practical Domains.* Proceedings of the 14th International Conference on Computational Linguistics, Nantes, France

Papegaaij W. and Schubert R. (1988): *A Corpus-based Bilingual Knowledge Bank for Distributed Language Translation.* Amsterdam, DLT Publications

The Universal Networking Language beyond Machine Translation. Hiroshi Uchida, Meiying Zhu, UNDL Foundation September 26, 2001:http://www.undl.org/publications/UNL-beyond%20MT.html

Wittkam, Toon: *DLT: an industrial R & D project for multilingual MT.* BSO /Research, Utrecht, The Netherlands in Proceeding COLING '88 Proceedings of the 12th conference on Computational linguistics - Volume 2 Pages 756-759 Association for Computational Linguistics Stroudsburg, PA, USA ©1988

Ricevita 2013-06-03

Adreso de la aŭtoro: guilherme@winart.com.br .

Sketch of the use of constructed languages in machine translation (Summary)

This historical sketch describes the automatic translation which went through periods of optimism and pessimism to the contemporary realistic time where Google has popularized it. It analyzes the processes used in MT which has changed from complex regular-based method to statistical one. The inter-language translation immediately felt the need to use one bridge language, initially they have created a specific language (UNL) for this purpose and after used Esperanto (BSO / DLT), the most well-known artificial language, and they will see whether Esperanto worked in that role.

Oficialaj Sciigoj de AIS
Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino
Fondita en la Respubliko de San Marino
Prezidanto: OProf. Hans Michael Maitzen, Inst. f. Astronomie, Türkenschanzstr. 17, A-1180 Wien
Informofico: OProf. R. Fössmeier, informo@ais-sanmarino.org, **www.ais-sanmarino.org**
Konto: 2051-305 Postbank Hannover (BLZ 250 100 30)
Redakcia respondeco: OProf. Dr.habil. Reinhard Fössmeier Finredaktita: 2014-01-31

Einladung zur ordentlichen Mitgliederversammlung der AIS – Internationale Akademie der Wissenschaften (Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino) e.V. (vormals AIS Deutschland e.V.) sowie zur Vollversammlung des wissenschaftlichen Sektors der AIS am Freitag, 30. Mai 2014, 16:00 – 17:00 Uhr in der Protestantischen Theologischen Fakultät der ULBS, B-dul Victoriei, Sibiu, 550024, Rumänien.

Die Versammlung findet im Rahmen der Tagung der rumänischen AIS statt. Nähere Informationen unter www.ais-sanmarino.org/arangxoj/ro/ro20140530

Tagesordnung:

1. Formalien (Beschlussfähigkeit, Stimmrecht, Protokoll, Tagesordnung)
2. Allgemeiner Bericht, Kassenbericht
3. Entlastung
4. Wirtschaftsplan 2014
5. Entscheidung über Anträge aus TOP 1
6. Verschiedenes

Wien, 2014-01-31,
OProf. Hans-Michael Maitzen

Invito al membrarkunveno de AIS – Internationale Akademie der Wissenschaften (Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino) e.V. kaj al kunsido de la Ĝenerala Asembleo de AIS je vendredo, 2014-05-30, 16:00 – 17:00 en la ejoj de la Protestanta Teologia Fakultato de ULBS, B-dul Victoriei, Sibio, 550024, Rumanio.

La kunveno okazas kadre de sesio de la rumana AIS. Detalaj informoj estas disponeblaj ĉe www.ais-sanmarino.org/arangxoj/ro/ro20140530

Tagordo:

1. Formalaĵoj (kvorumeco, voĉrajto, protokolo, tagordo)
2. Ĝenerala kaj financa raportoj
3. Senŝarĝigo
4. Buĝeto 2014
5. Decido pri proponoj el tagordero 1
6. Diversaĵoj

Vieno, 2014-01-31,
OProf. Hans-Michael Maitzen